

Oficiala organo de Oomoto kaj Ĵinrui Aizen-kai (UHA)

Oomoto

n-ro 453
2006
jan-dec



ISSN 0388-0672

Enhavo

Oficiale komenciĝis la interrilato kun Ŝonbulismo	1
Sciigi la dulingvan sistemon de Indonezio al eŭropanoj	5
Demandoj kaj respondoj pri Oomoto.....	10
“Fidele al elkora krio” Konvinkiĝo de Vivĝojo (4).....	19
Bonvenon al Oomoto en 2007	24



Čooseiden en Ajabe



Banšooden en Kameoka

La kovrilo: Montoĉeno Tatejama, montego Okudainiĉi

< Micugi Deguĉi >

Ekleviĝas supren la vualita nebulo, kaj aperigis sin la montego Okudainiĉi.

Oomoto

Oficiala organo

de Oomoto kaj Ĵinrui Aizen-kai
(Universala Homama Asocio — UHA)
Internacia Fako de UHA,
Ten'on-kjoo, Kameoka-ŝi,
Kioto-hu, 621-8686 Japanio

Telefono: + 81 (771) 22-5561

Telefakso: + 81 (771) 25-0061

Interreto: oficejo@epa.jp

<http://www.oomoto.or.jp/Esperanto/index-es.html>

Fondita en 1925

Numero 453, 2006 januaro–decembro

Administranto: Tokio Kanakogi

Redaktoro: Masamiĉi Tanaka



Konohana'an en Ajabe

Oficiale komenciĝis la interrilato kun Ŭonbulismo

Masamiĉi Tanaka

Ŭonbulismo estas religio kiu fondiĝis en 1916 en Koreio. Eble kelkaj el niaj legantoj ĉeestis la fakan kunsidon de Ŭonbulismo en la UK—oni komencis okazigi la fakan kunsidon Vilne en 2005 kaj ĉijare en Florenco.

De antaŭ dekoj da jaroj, Oomotanoj kontaktas kun la Ŭonbulanoj kaj vizitis la Ĉefsidejon en la urbo Iksan kiam ili partoprenis en la esperantaj eventoj en Koreio. Ankaŭ Ŭonbulanoj vizitis la Centran Oficejon de Oomoto en Kameoka por partopreni la esperantajjn kursojn. Tamen tiuj kontaktoj kaj vizitoj estis personaj. Sed en tiu ĉi jaro niaj interŝanĝoj fariĝis oficialaj.

En la 3a de aprilo, Pastrino Hyo-Chul Kim, Direktoro de Internacia Fako de Ŭonbulismo kaj Prof. Namgun Moon, profesoro de Universitato Ŭongŭang kaj la eksprezidanto de Junulara Asocio de

Ŭonbulismo, kaj Prof. Lee Jung-kee de Universitato Dankook vizitis Oomoton. Prof. Lee partoprenis en la Japana Kongreso en Kameoka en 1983. De tiam li daŭre kontaktas kun Oomoto, kaj gvidis siajn lernantojn pli ol tricent al Kameoka por partopreni en la esperantaj kursoj. Li ricevis la Premion Onisaburo Deguĉi en 2002 por sia internacia kunlaboro kaj organizo de esperantaj kursoj. Li membriĝis en Ŭonbulismo en 2004.

Ili intervidis kun la Spirita Gvidantino Kurenai Deguĉi, Prezidanto Jasumi Hirose kaj la Ĉefdirektoro de la Centra Oficejo, Kunihiko Ŝimamoto, kaj ambaŭflanke promesis daŭrigi nian religian interrilaton.

La dua interŝanĝo estis ĉe la 7a Internacia Medito-Kurso de Ŭonbulismo julie 2006 en Songĝu, Koreio. Antaŭajn 6 kursojn oni organizis en la angla lingvo,





tamen tiun ĉi kurson oni organizis en Esperanto. El Oomoto partoprenis 11 membroj inkluzive de Vicprezidanto de Universala Homama Asocio, Hirohiko Inagaki (4 membroj el la Centra Oficejo en Kameoka kaj aliaj 7 membroj el diversaj partoj de Japanio), kaj gesinjoroj el Aŭstralio, entute 13 esperantistoj partoprenis en la kurso.

En la vespero de la 18a de julio, ni alvenis en la Trejnejo Samdong en Songĝu, kiu estas unu el la Sanktaj Lokoj de Ŭonbulismo kie naskiĝis la Dua Ĉefmajstro Ĝongsano.

Tiun ĉi medito-kurson organizis la Internacia Fako de Ŭonbulismo, kaj Pastrino Hyo-Chul Kim, Direktoro de la Internacia Fako, bonvenigis nin. Mi ĝojis nian revidon kun ŝi post tri monatoj. Ankaŭ mi ĝojis nian revidon kun Pastro Yong-Sang Won. Li studis Budhismon en la universitato en Kioto; tiam li ofte vizitis Oomoton kaj multfoje partoprenis en niaj transjaraj kursoj. Li havas karan memoron pri nia Kvara Spirita Gvidantino Kijoko Deguĉi, kiun li renkontis dum sia studado en Kioto. Mi ankaŭ ĝojis nian revidon kun Pastrino Sveka Jung, kiun

ni renkontis en nia transjara kurso en Kameoka kaj en la U.K. en Vilno.

Dum tri tagoj, de la 6a matene ĝis la 10a vespere, ni kune kun la Ŭonbulanaj amikoj, meditis, oferis preĝon, aŭskultis lekciojn pri la instruoj, kantis la himnojn, ĉantis la nomon de Amitabo, kaj skribis taglibrojn ktp.

Mi ŝatas la mediton, ŝajne ankaŭ aliaj partoprenantoj. La medito en frumateno estis tre agrabla. Antaŭe mi havis kelkajn spertojn mediti kun aliaj grupoj — kun la Islamaj amikoj en Mezoriento; ĉe la interreligia konferenco en San Francisko; kun indiĝenaj amikoj en Kanado.

Ni trovis multajn komunajn punktojn inter la instruoj de ambaŭ religioj. Ĉe la altaro ni vidas unu cirklon, kiu estas la fonto de ĉiuj estaĵoj en la universo, kaj la vero. Oomoto nomas tiun fonton Dio, ankaŭ la altaro de Oomoto estas simpla sen idolo aŭ statuo. La instruo de Kvar Gracoj estas same kiel la instruo de nia Tria Gvidantino Naohi Deguĉi: la Graco de la Ĉielo kaj la Tero, la Graco de Gepatroj, la Graco de Gefratoj, kaj la Graco de Leĝo. En Oomoto, la lasta

estas la Graco de Nacio. Ŭonbulismo kaj Oomoto ambaŭ aktive patoprenas en interreligiaj kunlaboroj enlandaj kaj internaciaj. Ties baza instruo estas la Trisamismo (unu principo, unu familio, unu laboro), kaj ĝi estas sama kun la instruo de nia Kunfondinto Onisaburo Deguĉi, Bankjoo Dookon (Ĉiuj Religioj devenas de la Sama Fonto). “La Vojo Unuigi Spiriton kaj Korpon”— ni trovas tiun instruon en la Rakontoj el la Spirita Mondo: la koncerna ĉapitro nomiĝas “Spirito Kvin kaj Korpo Kvin.”

Posttagmeze de la 21a de julio, Prof. Lee Jun-kee alvenis en la Trejnejo Samdong, kaj ni pilgrimis al la vilaĝo Sosong, la naskiĝloko de la Dua Ĉefmajstro Ĝongsano; ankaŭ al najbaraj vilaĝoj Soja kaj Baksil, kie ni aŭskultis pri la historio de la religio.

Post la pilgrimo, ni ekveturis de la Trejnejo Samdong per aŭtobuso al la Junulara Trejnejo Bene, kiu situas en profunda valo kaj montaro.

En la lasta programero, ni havis la honoron intervidiĝi kun la Ĉefmajstro Ĝuasano en la mateno de la 22a de julio



en la templo de Trejnejo Bene.

Reprezentante la Oomotanajn ĉeestantojn, Hirohiko Inagaki, Vicprezidanto de UHA, salutis, legis la mesaĝon de la Ĉefdirektoro Kunihiro Ŝimamoto, kaj transdonis al la Ĉefmajstro la memoraĵon de nia Spirita Gvidantino Kurenai Deguĉi. Oomotanaj ĉeestantoj kantis la himnojn de Ŭonbulismo kaj Oomoto, kaj ludis la muzikon de Jakumokotoo.

La Ĉefmajstro esprimis sian esperon pri la kunlaboro por la paco de la mondo, kaj daŭrigo de la medito-kurso en esperanto. Li propramane transdonis la memoraĵojn al ĉiuj ĉeestantoj. Poste en la ĝardeno oni fotis momoran foton kun la Ĉefmajstro, kaj la tuta programo finiĝis.

Ni ĉiuj impresiĝis pri la komunaj punktoj inter la instruoj de ambaŭ religioj, speciale pri la unueco de la mondo. Ni esperas ke Ŭonbulismo kaj Oomoto daŭrigos nian interrilaton kaj kunlaboros por la paco de la mondo. Sekvaj citaĵoj estas el la sanktaj skriboj:





“La tuta homaro devas kune unuiĝi kaj antaŭeniri al la vojo de komunaj bonvivo kaj prospero. Se paroli resume pri la vojo, la unua estas ke ĉiuj religiuloj de la mondo kune forigu la barilojn de la religioj kaj sektoj kaj sciu kaj sciigu, ke ĉiuj principoj de la mondo estas unu principo en unu barilo, kaj unuiĝu por konstrui unu mondon en la stato de unu principo en unu barilo. La dua estas ke ĉiuj rasoj kaj nacioj de la mondo kune forigu la limojn de la rasoj kaj nacioj kaj sciu kaj sciigu, ke ĉiuj rasoj kaj nacioj de la mondo estas unu familio en unu hejmloko, kaj unuiĝu por konstrui unu mondon en la stato de unu familio en unu hejmloko.” (“Mondo” ĉapitro 7 el “La Ĝongsana Instruo”)

“Unue ni, filoj de Dio, vivantaj kapeloj, nepre forigu la du fortikajn murojn mondan kaj moralan. Kio do estas la plej granda de la unua? Ĝi ja estas la kontraŭŝtata militprovizaĵo (ne la polica armilaro), kaj la ekskluziveco de nacia lando; kaj tiu de la dua estas malamikeco inter nacioj kaj gentoj, kaj ankaŭ partiececo inter religioj. Kaj laŭ mia opinio, la urĝa afero estas forigi la abstraktajn murojn antaŭ ol faligi la konkretajn.” (“Sankta Grupo” ĉapitro 5, volumo 64 “Rakontoj el la Spirita Mondo” de Onisaburo Deguĉi)

Sciigi la dulingvan sistemon de Indonezio al eŭropanoj

Etsuo Miyoshi

Mi ŝatus rakonti, kion fervore rekomendis al mi s-ro Tiŝlar, kroata ĝenerala sekretario de EEU, ĉe la Litova UK.

En Indonezio estas uzataj la java, sunda, malaja k.a. lingvoj de resp. 60, 23 kaj 18 milionoj da loĝantoj kaj plie, ekzistas onidire plimalpli 740 insulaj lingvoj. Ĉar al la loĝantaro mankis interkompreno, antaŭ 70 jaroj oni kunvokis lingvistojn por konstrui pli kaj pli dignan artefaritan lingvon kun pleje reguligita malaja kiel bazo. Ĝi estas senakcenta, havas plenan akordon inter sono kaj skribo, 6 vokalojn, ege simplajn vortordon kaj tempojn; ekz. PERGI signifas 'iri' kaj aldonante 'hieraŭ' respektive 'morgaŭ' oni esprimas 'iris' respektive 'iros'. Per afiksoj oni povas krei multajn novajn vortojn. La strukturo de la "indonezia" pensigas la ekziston de azia Esperanto.

Prezidento Sukarno kun "Unu Lando, Unu Popolo, Unu Lingvo" kiel kerno de la sendependiĝa kor-deziro, instruigis ĝin intense al ĉiuj loĝantoj per la deviga eduko, kaj tiel atingis en ege mallonga periodo, ke la tuta loĝantaro ekpovis interkompreniĝi. Nun ĝi estas en la mondo laŭgrade la kvina nacia lingvo.

En la mondo ne ekzistas alia tia ekzemplo de popola interkompreniĝo en landego kun 237-milionaj homoj, kie apud la artefarita lingvo kiel la komuna, ankaŭ regionaj lingvoj uzatas, do se mi povus komuniki tiun

sukces-rakonton al la francoj, tio flamigus la ĉagrenon de ili komplete malvenkintaj kontraŭ la angla, kaj ĉu tiam la popolo kaj gvidantoj ne agnoskos la eblecon de Esperanto?

Reveninte al Japanio, mi ricevis multajn diversajn informojn de s-ro Matsumoto, kiu elgradiĝis el la indonezia fakultato de Universitato Osaka de Fremd-Lingvoj kaj laboras en Oomoto. Li proponis ke mi konsultu la indonezian ambasadorejon. Tamen mi pensis ke tio fariĝus unu-direktaĵo kaj eĉ se mi sendus leteron al la ambasadoro, tio apenaŭ progresigus la aferon.

Hazarde, la 26-an de septembro mi flugis al Tokio – kiam aperis tutpaĝaj E-anoncoj en 5 orient-Eŭropaj landoj, en la Eŭropa Tago de la Lingvoj – mi provis trud-viziti la ambasadorejon. Ĉar ja subite alvenis kamparulo por renkonti la ambasadoron, estis tute nature ke la pordisto baris la eniron al tia malnormala strangulo. Li plurfoje telefonis al sia superulo, sed tiu persistis: "homo sen rezervo ne rajtas enveni; bonvolu reiri". Mi komencis klarigi pri la monda lingvoproblemo kaj insiste provis persvadi la gardiston, sed eĉ la sekretarion mi ne povis renkonti. Mi atendis ĝis aro da viz-petantoj estis pasinta kaj kvazaŭ preĝis lin: "Mi venintas ŝargita de la EEU-esperoj, kaj ne povas reiri". Indis pli ol 15 minutojn persisti, ĉar finfine mi estis akompanata al la

sekretario.

Je mia eniro ŝi tuj ekdiris “Mia nomo estas Hikita. Fakte, hodiaŭ mi estas ege okupita. Mallonge, mi petas”.

Mi klarigis: “Dum la homaro luktas kontraŭ la angla, la angluloj povas sin dediĉi al avangarda teknologio kaj novaj inventoj”, kaj plue “Pli kaj pli larĝiĝas la diferenco inter riĉo kaj malriĉo, kaj malĉesas eksplodoj de terorismo. Per Esperanto, lernebla per 5ona peno kompare kun la angla, oni protektas la lingvan egalecon, kaj malfermas vojon al interparolo pri vera mondpaco”. Kaj petante “Mia celo estas ricevi permeson intervjui vian Prezidenton por rakonti la sukces-historion de la dulingva regno Indonezio en tutpaĝa anonco en franca ĵurnalo”, mi elmetis la 15 E-anoncojn jam publikigitajn en EU-landoj kaj daŭrigis mian klarigon.

La ĉ. 50jara sinjorino ne plu menciis sian okupitecon kaj foje murmurante admiris mian parolon. Ŝi diris “Tio estas problemo de la tuta homaro, ĉu ne? Bonvolu, s-ro Miyoshi, skribi rekte al la prezidento”, kaj flustris al si mem “Mi sentas ke la ŝanco estas ne-nulo”. Tajpinte nomojn kaj adresojn de la prezidento kaj ambasadoro, kaj dirante

“bonvolu sendi kopion al la ambasadoro”, ŝi akompanis min ĝis la elirejo.

Mi sentas ke la kialo por povi transiri la gardejon estas, ke por viziti mi estis aviadile veninta el provinco fora je 700 km, kaj plie en rulseĝo, kaj tio movis la estron. La sekva konkluda bariero estas kiel la prezidento juĝos mian leteron – por kio mi eĉ petis helpon de la spirita gvidantino de Oomoto. Se prezidento Yudhoyono jesus, multaj

legantoj kaj gvidantoj en Francio ekhavos novan konscion pri Esperanto kiel komuna lingvo de EU.

La letero al la prezidento tekstis jene:
1. Miaj vivceloj estas administri kompanion de gantoj, valizoj kaj rulseĝoj. Krome, mi streĉas ĉiujn fortojn por disvastigo de E-o, lernota kiel dua lingvo apud la nacia, kiel komuna lingvo por la tuta homaro.
2. Klarigo pri la iniciatinto de E-o, ĝia historio

ekde la naskiĝo kaj karakterizaĵoj.
3. EU agnoskis 20 oficialajn lingvojn, sed praktike angliĝos.
4. Dum la jaroj 1921-1923 Inazo Nitobe, la vic-ĝenerala sekretario de la Ligo de Nacioj, apelis al la 44 membro-ŝtatoj, oni traktis rezolucion pri la instruado de Esperanto kiel deviga lerneja fako, sed per



la vetoo de Francio, kiu volis ke la franca estu la internacia lingvo, ĝi malakeptiĝis kaj la angla fariĝis la ĉefa lingvo en EU. 5. La itala EU-parlamentano J. Dell'Alba klarigis proponon en la EU-parlamento en Strasburgo en la 1-a de aprilo 2004; ĉ. 43% subtenis Esperanton, sed bedaŭrinde la propono estis ne akceptita. 6. Via lando libere uzas sian hom-kreitan lingvon indonezian kaj eĉ 740 regionajn lingvojn, kaj estas la nura lando kiu sukcesis fariĝi dulingva regno. Tial mi deziras prezenti vin en tag-ĵurnaloj franca kaj aliaj EU-landaj, por rakonti la sukcesan ekzemplon. 7. Jam mi aperigis 15-foje en 13 landoj, pri la utileco de Esperanto, de kio mi kunsendis kopiojn. 8. Historio de mia kompanio, mia E-vivo kaj Mond-federisma aktivado.

Ĉi-suprajn tradukis al la indonezia s-ro Matsumoto de Oomoto, sed pri kelkaj detaloj li ne certis, do okazis konsiliĝo kun la indonezia konsulejo en Osaka. Tiam la konsulo mem legis mian leteron kaj diris ke li nepre volas kunlabori. Sekve la teksto estis provlege korektita kaj meze de aprilo sendita al Indonezio.

Plie, la 10an de julio mi inform-petis ĉe la konsulo en Osaka pri la aktuala stato. La afero estis jam notita sur la prezidenta planlisto; oni petis min atendi dum 1-2 monatoj.

Tiuokaze mi ankaŭ sciigis: "Se mi ricevus la konsenton de la Moŝta Prezidento intervui lin, la organizo de ĵurnalistara konferenco de tutmondaj ĵurnalistoj en Jakarta donus ŝancon informi la mondon ke la angliĝo de la mondo estas treege konvena por kelkaj

angla-lingvaj landoj, sed aliflanke trudas senprecedencan ŝarĝon al la grandega plejmulto, kaj kaŭzas malegalecon kiu kontraŭ-agas demokratecon kaj justecon. Kiam mia plano realiĝas, aperos ŝancoj altiri mon-fontojn el la financa sektoro de Japanio, kaj eblos daŭrigi la anonc-kampanjon en ĉiuj EU-landoj".

Fakte, ekzemple de novaĵ-agentejo liveranta novaĵojn al 45 regionaj gazetoj tra la tuta Japanio, mi jam ricevis peton pri ĵurnalista konferenco en Jakarta, se la intervjuo kun la prezidento efektiviĝos.

Al la konsulo mi ankaŭ petegis: "Per la paralela uzo de neŭtrala, facile lernbla komuna lingvo kaj siaj etnaj lingvoj, homoj ĉie en la mondo povus fariĝi dulingvaj, la deziro kaj revo de la homaro tut-historie. Tio estus mov-forto cele al la konstruo de mondpaco. Aktivigo de la mondo per la diskonigo de la valor-plena sperto de via lando signifas ke oni eterne laŭdos la indonezian sukceson. Por laŭeble rapide realigi tion, mi sincere petas vian kunlaboron".

Nu, tiuj estas ege grandiozaj vortoj, sed ĝuste pro la propono de s-ro Tiŝljar ŝajnis disvolviĝi eblecoj super-imagaj. Elkore mi dankas por lia propono. Ankaŭ la ambasadoro de Indonezio en Tokio bonvolis telefoni al mi dirante ke li senrezerve kunlaboros. Do, laŭsekve de tio kaj la traduka helpo de la konsulejo en Osaka, mi sentas ke la ŝanco por realigo de la intervjuo estas granda. Pro la pluraj ter-tremegoj kaj la erupto de politikaj konfliktoj en Orienta Timor, penseblas ke la prezidento ne povos trovi tempon, sed mi volas provi ĉiuforte.

Plie, la plimulto da mondanoj tute ne scias, ke Indonezio sukcesis kiel du-lingva regno, kaj ke ĝia komuna lingvo estas artefarita. Al multaj eŭropanoj dirantaj “Esperanto ne havas kulturon, ne eblas uzi artefaritan lingvon internacie”, tio estos unika persvada nova informo. La granda plimulto da eŭropanoj ne scias, ke Esperanto estas la plej regula kaj bela lingvo, de kiu draste for-rabotiĝis la malfacilaĵoj de etnaj kaj naciaj lingvoj.

Fakte, la 26an de septembro ĉijare — “Eŭropa Tago de Lingvoj” — kunlabore kun EEU kaj UEA, ni planas inviti la franc-lingvajn EU-parlamentanojn, 78 francoj kaj 24 belgoj, al certa hotelo en Bruselo por “vespermanĝa debato pri komuna lingvo”. Mi ne antaŭscias, kiom da EU-parlamentanoj ĉeestos, sed ni volas defii

la eblecon malfermi breĉon. Se belgaj E-istoj povus helpi min por tiu evento, mi sincere petas ilian favoron.

La naskiĝo de la EU estas la nura, unua kaj lasta ŝanco. Se EU adoptus Esperanton, en palpebruma tempo la landoj de la mondo sekvus, kaj oni povus hisi la finvenko-flagon de Esperanto, mi pensas. Koran dankon por via afabla aŭskultado.

“Vespermanĝo-Debato: Unu Paŝon Antaŭen”

En la 3a de oktobro 2006 okazis en

hotelo Amigo en Bruselo, urbo kie ĉefsidas la EU, “Vespermanĝo-debato pri komuna lingvo” al kiu kunlabore kun la Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) estis invititaj la 107 francparolantaj deputitoj (el Francio, Belgio kaj Luksemburgio).

Tamen, bonvolis partopreni Harvard-profesoro van Parijs, kiu deflanke impulsas la estron de la EU-komisiono pri multlingveco Figel kiu emas akcepti la nunan angliĝon,



prof. Baetens de la Libera Universitato de Bruselo kiu forte favoras multlingvismon, kaj francaj, belgaj kaj italaĵaj diplomatoj ĉe EU. Ili venis anstataŭ deputitoj kiuj pensas ke la elekto de la angla kiel komuna lingvo de EU estas neniel haltigebla, aŭ kiuj ne multe interesiĝas pri lingvopolitiko.

Niaflanke ĉeestis EEU-prezidanto dro O Riain, diplomato ĉe la irlanda ambasadorejo en Bruselo, EEU-vicprezidanto s-ino Witdoeck, Esperantisto kaj EU-parlamentano s-ino Handzlik, la slovak

diplomato s-ro Reinvar kaj mi, sume 5 personoj. La interparolo okazis franclingve kaj s-ino Witdoeckt interpretis.

Ili konstante argumentadis: “La angla estas jam disvastiĝinta tra la mondo, kaj per ĝi oni komercas. Do, estas plej nature uzi ĝin kiel komunan lingvon”.

Prezidanto O Riain daŭrigis sian mild-tonon sed fortan persvadon. Dirante “La esperanto-Wikipedio jam havas pli ol 59,000 artikolojn, kaj ĉiutage almenaŭ unu nova libro publikiĝas en Esperanto. La Papo ekuzis ĝin publike en 1994, kaj intertempe daŭre uzas ĝin. “Pro la principo <unu litero, unu sono> ne necesas prononcindikoj” kaj “Ĝi estas latinbazita do Eŭropanoj povas ĝin ellerni per dekono da laborpeno ol la anglan” li priparolis la avantaĝojn de Esperanto.

Plie li kontraŭargumentis: “En Hungario ĉiujare 7-8 mil personoj studas Esperanton universitate kaj elgradiĝas en ĝi” kaj “Eĉ pagante al Britio jare 17 miliardojn da eŭroj por studi la anglan, lerni eksterlande, inviti instruistojn ktp, EU-loĝantoj tute ne atingas la nivelon de Britoj. Esperanto plene protektas la intergentan egalecon.”

Mi eldiris: “Indonezio uzanta paralele homfaritan komunan lingvon indonezian kaj ĉ. 740 insulajn lingvojn, estas ekzemplo de regno sukcesinta iĝi dulingva. Nun mi estas petinta al ĝia ŝtatprezidanto intervjuon, kaj se tio sukcesos, mi planas prezenti lin en franca tagĵurnalo.” Kaj “Dum la homaro baraktas kun la angla, nur angle-parolantoj povas sin dediĉi al avangarda teknologio kaj novaj inventoj”, “Pli kaj pli profundiĝas la abismo inter riĉo kaj malriĉo, kaj ne haltas eksplodoj de teroro.” Mi klarigis: “Protektiĝas lingva

egaleco kaj unuafoje malfermiĝas vojo al interparolo cele al vera mondpaco”.

Parlamentano Handzlik diris “Multaj polaj EU-parlamentanoj scipovas la anglan, sed ne-kapabluloj ne povas partopreni en la diskutoj kaj restas komplete ekster-afere.”

Ili ne sciis kiel respondi kaj prez. O Riain ŝanĝis la fluon provokante “Kvankam laŭ la EU-konstitucio la popoloj kaj lingvoj de ĉiuj membro-ŝtatoj estas egalaj, pro la uzo de la angla kiel komuna lingvo, kio okazas al la konstitucia spirito, al demokratio kaj justeco?” La diskuto ekis je la 8:00h kaj finiĝis maljam nur je la 00:40h nokte; pro mia dunokta-kvartaga salt-vojaĝo kaj la pli ol 5-hora debato mi estis plene elĉerpita.

Sed, eble pro nia homara vidpunkto, pro la entuziasmo de ni alvenintaj el Japanio kaj diversaj eŭropaj landoj aŭ pro mia viv-veta anonckampanjo ks, ili sentis simpatian kaj ilia rezistemo videble moliĝis.

Fine ankaŭ ili agnoskis, ke “En la mondo ekzistas seriozega lingva diskriminacio, kaj indas vekti la politikistojn kaj civitanojn, ĉar tiu problemo meritas pridiskuton.” Plie, mi ricevis retroŝtaĵon de prez. O Riain, ke li invitis la plej rezisteman prof. van Parijs kaj lian edzinon vespermanĝi en la 8a de oktobro ĉe si, kaj tiuokaze la profesoro diris “La vespermanĝo-debato estis ege signifoplena”.

Unue mi pensis, ke pro la ne-partopreno de parlamentanoj malsukcesis la ĉifoja debato, sed konsiderante, ke ni ŝanĝis la vidpunkton kaj pensmanieron de influhavaj eguloj de la partio antaŭenpuŝanta la anglan, mi pensas, ke ĝi lasis almenaŭ gravajn spurojn.

Demandoj kaj respondoj pri Oomoto

25. Kiel Oomoto rigardas aliajn religiojn?

Ĉiuj religioj instruas pri la amo kaj bono de Dio (Budho). Tial, Oomoto tute ne akuzas aliajn religiojn falsaj. Oomoto instruas ke ĉiuj religioj devenas de sama fonto, de unu sola Dio kiu kreis la tutan universon; tio signifas ke ĉiuj religioj adoras la saman Dion.

En la mondo ekzistas diversaj religioj, kiuj diferencas laŭ la moroj, kutimoj, naciecoj kaj tempoj en kiuj ili fondiĝis. Sed eĉ se diferencas la nomoj de Dio, ritformoj kaj doktrinoj, ili havas komunan celon efektiviĝi al la homaro pacon kaj feliĉon.

Ĉiu religio devas forĵeti siajn antaŭjuĝojn, kaj ĉesi kalumnii aliajn, ke tiuj ĉi estas falsaj. Kaj ili kunlaboru mano en mano, manifestante siajn komunajn misiojn por purigi kaj evoluigi la socion de la homaro.

Sed, lastatempe aperis "falsaj religioj" kiuj nomas sin religioj kaj okazigas tumultojn en la mondo. Ili tute ne estas veraj sed naskitaj de malicaj koroj.

Tradukis Masaaki Sakaŝita

26. Kiel Oomoto gvidas homojn?

Al la homaro animo estas donita de Dio, kiu kreis ĉion en la universo kaj la homoj estas gefiloj de Dio kaj ankaŭ gefratoj unuj kun la aliaj.

Kunfondinto Deguĉi Onisaburo versis jene :

Dio favoras la homaron
per Sia parto-animo
tial la homaro ja estas
la gefiloj de Dio
kaj la sanktaj loĝejoj de Dio.

Nature la homa animo estas tiel pura kaj bela same kiel tiu de Dio. Sed nuntempe, malvastaj egoismaj ideoj profunde radikiĝis en homajn korojn. Pro tio la homoj makulis, malpurigis sian puran animon donitan de Dio, ili ne povas rekonigi la ekziston de sia Kreinto mem. Oomoto celas ke homoj repurigu sian animon pura.

La homo kun pura animo havas veran kuraĝon, saĝon, amon kaj amikecon, kaj tiuj aperas en siaj vortoj kaj agoj. Antaŭ ĉio gravas ke ni rekonu nian belan animon donitan de Dio kaj en ĉiutaga laboro ĉiu el ni ĝuste praktiku sian virton, pozitive plenumu ĉiujn aferojn. Masaaki Sakaŝita

27. En la mondo oni diras ke okazas puno de Dio. Kiel opinias Oomoto pri tio?

Dio estas la fonto de amo, kaj Li estas amo kaj bono mem. Dio savas kiun ajn eĉ homon kun granda peko. Dio estas absolute plena, Li neniam forlasas eĉ unu pekulon. Homo punas pekulon, kaj laŭdas bonulon. Tia ago venas el homa malvasta koro, kio ja senkompare

diferencas de senlima amo de Dio.

Dia koro estas tia ke Li volas senfine ami kaj senĉese savi. Se Dio tenus abomenon eĉ iometan, Li jam ne plu estus Dio. Oomoto ne predikas ke Dio punas. En la mondo diversaj malfeliĉo kaj katastrofoj okazas kaj ili ŝajnas kvazaŭ punoj, tamen nenio venas de Dio. Tiuj estas la rezultoj de malklereco, malico kaj fataloj de homoj. Malakordiĝo de homaj sentoj rezultigas malbonajn konkludojn, kaj iliaj inferaj sentoj faris malfeliĉon.

Dio penas demeti malklerecon kaj malicon kiuj estas la kaŭzoj de malfeliĉo kaj katastrofo, kaj Dio penas instrui homojn por ke oni vivu ĝoje kaj sincere.

Masaaki Sakaŝita

28. Kion oni instruas en Oomoto?

En la sankta skribo de Oomoto ni legas jenajn vortojn de Prapatra Dio:

“Vizitu Oomoton en Ajabe kaj aŭskultu Dian instruon. Mi favoros vin per Diforto travidi ĉion en la mondo per unu rigardo”, tiel la Fondintino Deguĉi Nao, la Kunfondinto Deguĉi Onisaburo, kaj Spiritaj Gvidantinoj kaj Kungvidanto elmontras abundajn instruojn. Ĝi ampleksas la priskribojn pri diaj aktivadoj de la komenco de la universo ĝis nuntempo, kaj ŝanĝiĝoj de la universo, kaj menciindaj trajtoj de la hodiaŭa mondo, ideala mondo en estonto, kaj krome, la aktivado de savdioj de la praepoko ĝis moderna, kaj pri interrilatoj inter Dio kaj homoj, ktp.

Plue, la instruoj de Oomoto temas pri la konsisto de la spirita mondo, postmorta vivo, la vera vivcelo, ĉiutaga vivmaniero

individua, kaj ĉiu fako de la homa aktivado: politiko, ekonomio, arto, religio, edukado, ktp. Ĝi klarigas ĉiujn aferojn en la universo tre detale. Ni povas diri ke por la unua fojo la sekreto de la universo estis malkovrita.

La instruoj de Oomoto klarigas komplete kaj profunde la veran staton de tiu ĉi mondo kion neniu el la sanktulo aŭ filozofo povis klarigi. Masaaki Sakaŝita

29. Kiel Oomoto rigardas hodiaŭan malordan socion?

De la jaro 1892, kiam fondiĝis Oomoto, la sankta skribo de Oomoto, revelaciita al la Fondintino, avertis ke en la mondo okazos tia kaoso, kiun ni vidas hodiaŭ.

En la sankta skribo ni legas jenajn vortojn: ĉio en la mondo estis malĝusta, ignorante Dian providencon, deviinta al homa egoismo; Dio anstataŭigos ĉion radikale per justa principo, kaj la mondo estos rekonstruita tiel pura kaj bela kiel kristalo. Por purigi la mondon, okazos granda ŝanĝo kaj kataklismo individue, mondscale, en spirita fako kaj fizika.

Nuntempe, kiel la sankta skribo de Oomoto avertis, konfuzaĵoj kaj drastaj ŝanĝiĝoj okazas en la mondo, ne nur bonaĵoj sed ankaŭ diversaj tragikaj malbonaĵoj; ĉio ĉi estas la doloro de akuŝo por rekonstrui la novan mondon pli bonan. Al la Dio, kiu plenumadas sanktan laboron grandscale rekonstrui la mondon, ni preĝas ke la grava malfeliĉo estu en malpli grava formo, kaj la malpli grava: preskaŭ nerimarkebla, kaj ni kondukas fidele observante la instruojn de Dio. Masaaki Sakaŝita

30. Kiel Oomoto rigardas hodiaŭan socion, en kiu ekzistas diferenco inter riĉulo kaj malriĉulo, kaj homaj klasoj?

Laŭ la vidpunkto de feŭdisma epoko, ni povas diri ke tiuj diferencoj malgrandiĝis, tamen ili ankoraŭ restas. Laŭ Oomoto-vidpunkto ni devus aserti ke la diferenco inter riĉo kaj malriĉo devos esti malgrandigita en la ideala mondo, sed tio ne signifas ke la diferenco tute malaperos en la ideala mondo.

Ĉiuj herboj nature malsamas en sia kreskiĝo, kaj nature okazas la diferencoj, same inter homoj denaske okazas diferenco de saĝeco kaj diferenco de beleco, kio restas ekster homa povo. En Oomoto, se oni traktus egale homojn diligentan kaj maldiligentan, tio devas esti kondamnita.

De la komenco, en nia mondo ĉiuj estas kreitaj malsame en grandeco, boneco, ktp, tial nature ekzistas diverseco. Tamen, se la diferencoj estus faritaj nenature, ni ne akceptus ĝin. Homoj reciproke respektas, kaj oni okupiĝas pri la laboro taŭga laŭ sia kapablo, tiel ĉiuj homoj povos vivi kune kun ĝojo kaj kontento. Tiu societo estas nia idealo. Masaaki Sakaŝita

31. Kiel Oomoto rigardas komunismon, socialismon kaj kapitalismon?

Oomoto opinias ke komunismo, socialismo kaj kapitalismo, kies ideoj estis konstruitaj surbaze de materiismo, pereos kaj post tio nepre venos la mondo, kiun regos la principo de teokratio.

Teokratio estas la principo de la socio kie homo altigas sian humanecon donitan de Dio kaj elmontras ĝin plene, kaj oni vere

ĝuas vivon kaj dankas al Dio, tie spontane aperos la ideala mondo. Tio ne estas la mondo konstruata en la kadro de homa doktrino. Kiam ĉiuj homoj praktikas sian humanecon donitan de Dio, bele kaj pure kun sia personeco, tiam nature konstruiĝos la mondo en akordo kun la volo de Dio. Ni faras diversajn agadojn por ke ĉiu homo elmontros sian humanecon trans doktrinoj.

Masaaki Sakaŝita

32. En kio Oomoto pensas ke kaŭzas la kaŭzoj de milito kaj konflikto?

En Oomoto ni opinias pri la kaŭzoj de militoj kaj konfliktoj, jene: tio multe dependas de homa intenco; nur se nia lando prosperas, kiaj ajn estu aliaj landoj, tia "egoisma sintenado" estas la kaŭzo de la milito.

Majstro Deguĉi Onisaburo montras jenajn vortojn: "ni, sanktaj loĝoejoj de Dio, devas klopodi forigi videblan kaj nevideblan, du grandajn barojn, el kiuj la plej granda videbla estas la armado (escepte de policarmado) kaj fermo de landlimo. Kaj tiuj de plej grandaj nevideblaj estas nome malamikaj sentoj inter nacioj kaj rasoj kaj ankaŭ inter religioj". (Rakontoj el la Spirita Mondo).

Kiel ni legas vortojn de la Majstro Onisaburo, ni povas aserti, ĝis la armado de la ŝtatoj estos abolitaj kaj malamikaj sentoj de homoj estos nuligitaj, la kaŭzo de milito neniam estos nuligita.

Masaaki Sakaŝita

33. Kiel en Oomoto oni pensas pri milito?

En Oomoto la milito estas la plej malbona peko de la homaro; "Dio

konsideras la vivon de unu homo pli valora ol la tero. En milito homoj rabas tiujn valorajn vivojn, kio estas la plej granda malbono". Tiel milito estas kondamnita. En decembro de la jaro 1945, kiam Majstro Deguĉi Onisaburo estis en la varma fonto Joŝioka en Tottori, lin intervjuis raportisto de la ĵurnalo Asahi, kaj ties raportaĵo aperis en la 30-a. Liaj vortoj altiris grandan intereson de mondo pro ĝia grava enhavo, kiu indikis al ni la ĝustan vojon por la rekonstruado de Japanio, en la postmilita kaoso.

La resumon ni prezentu : "La japana popolo neniam pereos. Japanio estas nun tute senarmigita, tio entenas la sanktan mision kiel la pioniro de mondopaco. Vera mondopaco estos realigita nur kiam ĉiuj armeoj en la mondo estos abolitaj. Nun jam tiu tago alproksimiĝas."

Surbaze de tiuj vortoj de la Majstro, post la milito Oomoto senĉese daŭrigas apelacion al la mondo koncerne de malarmado, kontraŭmilito, mondopaco tiel ke neniam plu okazu milito, kaj la koro de "memamo" de la homaro estu anstataŭigita de homamo, nome frateco.

Masaaki Sakaŝita

34. Kiel Oomoto antaŭdiras pri okazontaĵoj en estonteco?

La Fondintino Deguĉi Nao kaj Kunfondinto Deguĉi Onisaburo, ambaŭ estis rimarkindaj profetoj. "Diaj Revelacioj" verkita de la Fondintino kaj "Rakontoj el la Spirita Mondo" diktita de Kunfondinto estas granda kvanto da sanktaj skriboj kaj ili ambaŭ estas la libroj de antaŭdiroj.

La profetaĵoj klare eksplikas pri la rekonstruo de ĉi tiu senorda mondo al nova mondo per korektiĝo de homa koro kaj pri la transiĝo de la mondo de kiam Oomoto fondiĝis ĝis la kompletigo de la ideala mondo.

En "Diaj Revelacioj" Dio kun absoluta aŭtoritato asertas : "Sciu ke la vortoj de Dio realiĝos kun nenia eraro eĉ harlarĝo da diferenco. Se ne, Dio ne ekzistas en ĉi tiu mondo." Fakte tiuj profetaĵoj vere efektiviĝis. Ni povas diri tiuj antaŭdiroj estas deklaroj. Por plua studo oni bonvolu sin turni al la sankta skribo de Oomoto "Diaj Revelacioj".

Masaaki Sakaŝita

35. Kion Oomoto konsideras kiel idealon?

La idealo de Oomoto estas perfekte identa kun tiu de Dio. Ni esperas ke ĉio fariĝos paca kaj serena: ĉio en la reala mondo fariĝos same kiel en ĉielula regno—ni devas purigi ĉion en la spirita mondo kaj forigi malpuran inferon.

La idealo de Dio estas ŝanĝi la materian mondon kaj spiritan mondon al ĉielula regno, kaj akordigi ĉiun kun senlima vero, bono, belo kaj amo de Dio. Tio estas la idealo de Oomoto kiu penas servi al Dio.

Masaaki Sakaŝita

36. Kian mondon Oomoto konsideras kiel la idealan?

La devizo, "Unu Dio, unu mondo, unu interlingvo" simbolas la aspekton de ideala mondo.

"Unu Dio": kvankam la nomo de Dio diferencas inter religioj kaj sektoj, tamen ĉiu estas la nomo de la sama Kreinto de la

universo, la Plejalta Dio.

“Unu mondo”: unu granda familio de la homaro kaj starigo de tutmonda organizo de mon dofederacio.

“Unu internacia komuna lingvo”: ni adoptu Esperanton kiel oficialan internacian lingvon. Esperanto estas neŭtrala lingvo kiu apartenas al nenia nacio. Per Esperanto, en neŭtrala pozicio homoj povos senĝene interkomuniki.

Tiuj estas la aspektoj de la ideala mondo, kaj ni esperas ke la klimato en la mondo bonordiĝos, kaj katastrofoj kaj malsanoj malmultiĝos. En diversaj kampoj de politiko, ekonomio kaj scienco, internacia interfluo pli kaj pli pace vigliĝos.

Dume, ni esperas ke oni plialtigos sian religian sentimenton kaj aktivigos kulturalan movadon por purigi sian animon. Per tiuj aktivadoj, homaro estimos naturajn riĉfontojn, kaj kun dankemo pligrandigos publikan bonon. Kaj ĉiu individuo praktikos sian originalecon kaj povos ĝ oje okupiĝi je sia laboro. Tiamaniere spontane aperos la mondo, kie ĉiuj homoj kunprosperos kaj adoros Dion. Tia mondo estas nia idealo. Masaaki Sakaŝita

37. Kiamaniere Oomoto konstruos idealan mondon?

Oomoto neniam intencas konstrui idealan mondon nur per homa forto. En la sankta skribo de Oomoto troviĝas jenaj vortoj: “Dia plano de antaŭ Trimiljaroj.” La vorto “Trimiljaroj” ne signifas ties ciferan tempodaŭron sed tre longan tempon. De la pratempo Dio, antaŭvidante nuntempan

konflikton, starigis tiun perfektan planon por mondosavo. Kaj la mondo sin movas laŭ la plano.

De la jaro 1892, Prapatra Dio de la ĉielo kaj la tero Di-posedis la Fondintinon Deguĉi Nao, kaj tra la Kunfondinto Deguĉi Onisaburo kaj Spiritaj Gvidantinoj, Dio disvastigas la instruojn por savi la mondon, kaj plenumas Sian Sanktan Planon tra la mondo.

Unue, Dio konstruas la fonton de rekonstruo de la mondo, tra la mondoj spirita kaj materia. Sekve, Dio intencas disetendigi tiun originan modelon por iniciati la vojon al feliĉo kaj prospero de la homaro. Ni penas disetendi la idealon de Dio tra la tuta mondo kaj konstrui la idealan mondon kiu daŭros eterne, laŭ la gvido de Fondintoj kaj Spiritaj Gvidantinoj.

Por la realigo de la ideala mondo nepre necesas purigi nian animon de ĉiu homarano. Sen tio ni tute ne povos plibonigi homan socion kaj feliĉigi nin mem. En Oomoto, ni oferas preĝon al Dio por reformo kaj altiĝo de ĉiu el la homaro, kaj daŭrigas nian aktivadon sub la gardo de Dio.

Samtempe, laŭ la instruo, “vera religio kapablas gvidi la edukadon, politikon, arton kaj ĉion alian,” Oomoto gvidas politikon, ekonomion kaj edukadon kaj en diversaj fakoj de la homaj aktivadoj kaj efektive praktikas la instruojn kaj aktive disvastigas ilin enlande kaj eksterlande. Tiel Oomoto donas grandan influon al ĉio en la mondo kaj akcelas la progreson de la homaro. Kaj tiel laŭ Dia volo, Oomoto ludos gravan rolon kiel ĉefmotoro por

konstrui la idealan mondon sur la tero.

Masaaki Sakaŝita

38. Kiel Oomoto konsideras sciencan?

De la malnovaj jaroj oni emis pensi ke scienco kaj kredo ne povas kunekzisti. Tio ne estas vero. Progreso de scienco ebligas pli profundan komprenon pri Dio. Tial oni devas studi sciencan, kaj progresigi ĝin. Sed tamen, estas tro da orgojlo se oni pensus ke scienco solvas ĉiujn problemojn. Oomoto admonas nin pro orgojlo ĉar tia orgojlo de studentoj de scienco estas unu el la kialoj de la malordo de la nuna mondo.

La penso kaj volo de Dio, la Kreinto de senlima makrokosmo, superas homan supraĵan intelekton kaj sciencan. Homo nur povas scii pri peceto de Dia volo pere de la aferoj en la natura mondo.

Tiel, scienco klarigas nur unu peceton de Dio. Homa saĝo ne estas akirebla nur el libroj, sed estas sorbebla el la naturo kaj ĉiutagaj spertoj kaj ili profundigas homan saĝon. Homo devas studi sciencan kun modesta koro dum la tuta vivo, kulturi pli vastan konsideron, konjekti Dian koron profunde kaj kontribui al la feliĉo kaj prospero de homaro. Jasuo Tabuĉi

39. Kiujn librojn vi rekomendas al ni legi por detale sciigi pri Oomoto?

Oomoto havas ampleksajn sanktajn librojn (sanktaj skriboj, instrulibro, kaj aliaj). Ekzemple, "Rakontoj el la Spirita Mondo," skribita de Kunfondinto, havas 81 volumojn.

La legado de sanktaj libroj malsamas je la legado de ordinaraj ĵurnaloj kaj gazetoj. Ĉiuj vortoj kaj frazoj enhavas tre profundajn

internajn signifojn—nutraĵo de koro. Tio malfaciligas la legadon de sanktaj libroj pli ol la legado de ĵurnaloj. Do, ni prezentas sanktajn librojn laŭ la vico de facileco kaj komprenebleco por la legantoj. Unue ni rekomendas "Esplorado de Vivĝo" verkita de Hidemaru Deguĉi kaj sekve, "Kreado de Vivĝo" verkita de la sama aŭtoro. Poste "Diaj Vojsignoj", "Lumo de Dia Vojo" kaj "Vojo de Oomoto" verkita de Kunfondinto Onisaburo Deguĉi.

Jasuo Tabuĉi

40. Kiam fondiĝis Oomoto?

Oomoto naskiĝis en la jaro 1892 (la novjara tago en luna kalendaro), kiam Fondintino Nao Deguĉi eniris en la staton de spiritposedo de la Prapatra Dio kaj ekparolis Diajn vortojn.

Dio estas la Prapatra Dio, Kreinto de la universo, kies nomo ofte aperas en "Koĵiki" (kroniko pri malnovaj okazaĵoj) kaj "Nihonŝoki" (kroniko japana.) En tiu senco Oomoto estas religio kiu daŭre ekzistadis de la antikva tempo.

Dio, la Kreinto de la universo, revenis al tiu ĉi mondo en 1892 por savi nunan mondon de la tumulto kaj putro kaj por konstrui eterne neŝanĝotan belan mondon.

Nu, de la jaro 1836 kiam Fondintino naskiĝis, ĝis la jaro kiam Oomoto aperis—estis la tempo de granda ŝanĝo en Japanujo. La regado de Tokugaŭa Bakufu (ŝoguna registaro) putris, malsatego atakis tutan parton de Japanujo, grandskala kampara puĉo, movado por faligo de ŝoguna registaro en diversaj lokoj, tia tumulto tempo.... Finfine Tokugaŭa reĝimo falis. Imperiestra registaro komenci

ĝis. Ankoraŭ post tio daŭris la konflikto inter nova potenco kaj malnova potenco. Nova nacia reĝimo ankoraŭ ne estis firme solidigita. En tia epoko Oomoto aperis.

Ĝuste en tiu tempo, okazis Civila Milito en Usono, Liberigo de Servutuloj en Rusio kaj aliaj liberigaj movadoj progresis. Aliflanke, kapitalismo rapide progresis kaj granda ŝanĝo okazis mondoskale.

Jasuo Tabuĉi

41. Kiu estas Fondinto?

Ĝenerale fondinto estas nur unu de la mondaj religioj (Kristanismo, Budhismo, kaj Islamo.) Tamen Oomoto havas du fondintojn: Fondintino Nao Deguĉi kaj Kunfondinto Onisaburo Deguĉi. Tio estas unu el la karakterizoj de Oomoto. Fondintino skribis la librojn “Diaj Revelacioj” kaj Kunfondinto skribis la librojn “Rakontoj el la Spirita Mondo”. Fondintino koncize eksplikis pri la regulo de Dio. Kunfondinto instruis kaj klarigis la regulon al modernuloj en facile komprenebla maniero en la kampoj de politiko, ekonomio, edukado, religio kaj arto. La fundamento de la instruo baziĝas sur la instruoj de du fondintoj. Ni konsideras ke Fondintino kaj Kunfondinto aperis por gvidi ne nur Oomotanojn sed ankaŭ por gvidi la homaron. Jasuo Tabuĉi

42. Kia persono estis la Fondintino?

Nao Deguĉi fondis Oomoton, kaj ni nomas ŝin Fondintino. En la jaro 1836 ŝi naskiĝis en la nuna urbo Fukuĉijama, gubernio Kioto. Ŝi kreskis en ekstreme malriĉa familio; ŝi neniam lernis skribi aŭ legi. Ŝi servis kiel lernoknabino kaj maturi

ĝis. Ŝi vivis tre modeste kaj pure kaj plej fidele servis al siaj gepatroj, ke tiama feŭdestro en Fukuĉijama honoris ŝin pro ŝia fideleco.

Post maturiĝo ŝi edziniĝis, kaj vartis ok gefilojn, dume ŝi spertis multajn malfacilaĵojn kaj suferojn. Ŝi kompatis malriĉajn, molestatajn homojn malgraŭ siaj malfeliĉaj cirkonstancoj.

En la novjara tago en 1892, Nao Deguĉi je la aĝo de 57 subite eniris en la staton de Di-posedo. Neregebla forto igis ŝin elbuŝigi: “Mi rekonstruos ĉi tiun mondon kaj restarigos la pratempan Dian mondon.” Sekvis Diaj vortoj el ŝia buŝo: kiel ni vivu juste, admono al homaro kaj profetaĵo de mondorekonstruo. Ĉi tio estas la naskiĝo de Oomoto.

La voĉo de Dio venis el la fundo de ventro de la Fondintino, poste Dio komunikis pere de tuĉpeniko—Dio igis Fondintinon preni tuĉpenikon kaj ŝi aŭtomate skribis Dian mesaĝon.

Ŝi priverŝis sin per akvo multfoje eĉ en vintro kaj purigis sian korpon kaj spiriton. Post la purigado ŝi prenis la tuĉpenikon kaj skribis la vortojn de Dio. Ŝi skribadis dum 27 jaroj ĝis sia forpaso je la aĝo de 83 en 1918. La nombro de paperfolioj estas ĉirkaŭ 200,000. Poste ŝia skribaĵo estis prezentata kiel “Diaj Revelacioj”. Kune kun “Rakontoj el la Spirita Mondo,” ĝi konsistigas du sanktajn skribojn de Oomoto.

Severa kaj gracia vivo de Fondintino, kvazaŭ blanka umefloro en frosta vintro, alportas neesprimeblan, gracian temperamenton kaj edifis kredantojn.

43. *Kia persono estis Kunfondinto?*

Ni nomas Onisaburo Deguĉi Kunfondinto. Lia antaŭa nomo estis Kisaburo Ueda. Li naskiĝis en malriĉa terkulturista familio en 1871 en la suburbo de Kameoka. En la jaro 1898 kiam li estis 28 jaraĝa, li estas abrupte alprenata al kaverno de Monto Takakuma laŭ la gvido de la spirito. La asketismo daŭris sep tagojn. Dum tiuj tagoj li sidis sur roko en frosta vintro. Al li ne estis permesate trinki eĉ unu guton da akvo. Dum la asketismo lia animo eliris el lia korpo kaj esploris tra spirita mondo. Li ekkonsciis sian mision de la savanto de la mondo.

En la jaro 1900, li edziĝis kun Sumiko Deguĉi, la plej juna filino de Nao Deguĉi (poste ŝi fariĝis la Dua Gvidantino). Li instalas la bazon de Oomoto; diktis la “Rakontojn el la Spirita Mondo”, enkondukis Esperanton, komencis la kunlaboron kun mondaj religioj, progresigis artan movadon. Onisaburo donis preskaŭ ĉiun bazon de nuna agado de Oomoto. Sed La Dua Oomoto Afero (subpremo) okazis en 1935, kaj Onisaburo estis en malliberejo dum 6 jaroj kaj 8 monatoj. Tiel li havis neesprimeblan malfacilon por savi la mondon, kaj en 1948 li finis subliman vivon kun multaj sortoŝanĝoj. Li kun profunda scio respondis demandojn prompte kaj klare, kaj donis mondiskalan doktrinon kiel mondosava instruo. Liaj vortoj kaj agoj estis plena de amo. Li estis granda homo kiu trankvile akceptis diversajn persekutojn, kaj instruis kaj gvidis ĉiujn kun amo eĉ

44. *Kia persono estas nuna Gvidantino?*

Nuna Gvidantino de Oomoto nomiĝas Kurenai Deguĉi. Ŝi naskiĝis en 1956 en la urbo Kameoka, Kioto. De sia juneco ŝi servis al la Tria Gvidantino kaj la Kvara Gvidantino, kaj ricevis intiman edifon de ili. Ekde la juneco ŝi diligente lernis japanajn tradiciajn artojn kiel teceremonio kaj noa dramo. Post kreskiĝo ŝi aplikis sian pasion al la studo de farmacio, precipe orienta farmacio. Post kiam ŝi enoficiĝis kiel Spirita Gvidantino, ŝi praktikas la vojon kiun Fondintino, Kunfondinto kaj Gvidantinoj establis. Ŝi penas por paca agado bazita sur la instruo, socia movado protekti la dignon de homa vivo, movado kiu celas plibonigon de agrikulturo kaj vivmedio. Ŝi gvidas la membrojn lerni Esperanton kaj praktiki ĝin, kaj labori en la kampoj de arto, kulturo kaj sociala bono.

Jasuo Tabuĉi

45. *Kial Oomoto estis persekutata dufoje?*

La unua subpremo okazis en 1921, kaj la dua en 1935. Precipe en la dua subpremo, Oomoto ricevis drastan persekutadon. 1933 kaj 1934 estis la tempo kiam la mondo faŝismiĝis. Tiam Oomoto establis la asocion celante spiritan reformon de Japanujo. La movado disvolviĝis tra la tuta Japanujo, kaj akiris la milionojn da simpatiuloj. La tiama registaro miskomprenis la movadon kontraŭregistara. Precipe la troigo de la movado de la ekstrema parto kaj miskompreno de kredantoj al la movado kaŭzis la kompletan subpremon.

La opreso estis pro la suspekto pri la rompo de la Leĝo por Publika Ordo kaj Malrespekta Krime kontraŭ Imperiestro. En la afero, ĉefuloj—Kunfondinto Onisaburo, Dua Gvidantino Sumiko, Kungvidanto Hidemaru—kaj aliaj 50 estraranoj, estis metitaj en malliberejon. Aŭtoritatoj trude detruis la tombon de Fondintino, centron en Ajabe kaj Kameoka, kaj centojn da instalaĵoj en tuta Japanujo. Ĵurnaloj, gazetoj raportis “Oomoto estas herezo,” deforminte la veron. La verdikto de supera korto pri la rompo de la Leĝo por Publika Ordo deklaris senkulpa. La Plej Supera Tribunalo reĵetis apelacion, kaj verdiktis senkulpa.

Malrespekta Krime kontraŭ Imperiestro nuliĝis pere de la malvenko de Japanujo en 1945. Oomoto tute fariĝis senkulpa.

Jasuo Tabuĉi

46. Kion signifas la emblemo de Oomoto?

La emblemo de Oomoto estas dek cirkloj. La cirkloj estas metitaj jene: granda cirklo estas en la mezo kaj etaj cirkloj estas ĉirkaŭ la granda. Dek cirkloj simbolas la grandan universon. La numero dek signifas plenan kaj perfektan. En Oomoto, la emblemo de dek cirkloj signifas vigan laboron de Dio kiu etendiĝas senlime. Laboro de Dio estas plena tra la granda universo de la antikvo ĝis la eterno.

Oomoto ankaŭ havas alian emblemon: kruco en cirklo. Ankaŭ ĝi havas la saman signifon. Kruco signifas volon kaj laboron de Dio. Cirklo signifas grandan universon.

Jasuo Tabuĉi

47. Kie estas la sankta tereno de Oomoto?

Sanktaj terenoj de Oomoto troviĝas en la urboj Ajabe kaj Kameoka en la gubernio Kioto. Ajabe estas je ĉirkaŭ unu horo per JR-rapida trajno (San' in-Linio) de la stacidomo Kioto. Ajabe estas la loko kie Oomoto naskiĝis kaj nomiĝas Bajŝoo-en, ĝi estas la centro de diservo. Grandaj Festoj, servoj por prapatroj estas celebrataj en Ajabe.

Kameoka estas 30 minutojn per JR-trajno (San' in-Linio) de la stacidomo Kioto. La sankta tereno en Kameoka nomiĝas Ten-on-kjoo, kaj estas la centro de edukado kaj instruo. Tie troviĝas la granda kursejo, presejo, internacia fako ktp. Bajŝoo-en kaj Ten'on-kjoo ambaŭ estas serenaj terenoj, ĉirkaŭataj de verdaj arboj. Kredantoj honoras la sanktajn terenojn kiel la hejmlokon de animo kaj la plej sanktan lokon kie loĝas Dio.

Jasuo Tabuĉi

48. Kiom da kredantoj estas en Oomoto?

La nombro de kredantoj estas ĉirkaŭ 180,000. La kredantoj troviĝas tra la tuta lando, de la norda parto—Hokkajdo ĝis la suda parto—Kagoŝima, kaj Okinavo.

Multaj kredantoj kaj simpatiuloj troviĝas eksterlande, en Nord-Ameriko, Sud-Ameriko, Sud-okcidenta Azio (Filipino), Mikronezio (Ponpeio), Usono, Eŭropo kaj Mekisikio. En Brazilo troviĝas la Sud-Amerika Centro.

Jasuo Tabuĉi

dua parto

FIDELE AL ELKORA KRIO

4

Hidemaru Deguĉi, tradukis Eizo Itoo

Ĉio respektive estas vero

La “oriento” estas la vorto kontrasta al la “okcidento”. La “dekstro” kontrasta al la “maldekstro”. Ekzistas oriento, ĉar ekzistas okcidento. Sen okcidento, ne povas ekzisti oriento. Same kun dekstro kaj maldekstro.

Fajro kaj akvo; bono kaj malbono; viro kaj ino; spirito kaj korpo... ktp. — ĉio estas kreita kontraste. Kaj nur dank’ al tio naskiĝas la aktiveco kaj la ekzisto.

Kiel ekzistas nombro de minimumo ĝis maksimumo, tiel same en la mondo ekzistas ĉio de minimumo ĝis maksimumo.

Ekzistas la monto Himalajo; ekzistas la markanalo Tascarora. Ekzistas la polusoj, ekzistas la regionoj subekvatoraj.

Laboristoj krias “panon aŭ morton!”, ludantoj ĝuas laŭdante sian vivon, kvazaŭ “plenan lunon senmankan!”. La krio de la unuaj estas elkora, dum la ĝuo de la lastaj ankaŭ ne estas falsa.

La ĉevalo henas, la bovo blekas, la hundo bojas kaj la kato miaŭas. Ĉiuj laŭ sia maniero krias, senŝanĝe de la antikva tempo. Estas insektoj, kiuj ŝatas la lumon; estas insektoj, kiuj ŝatas la mallumon. Iuj nestas sur arbo, aliaj kaŭras en kavo. Iuj loĝas en necesejo. Iuj vivas en malpuraĵo, aliaj sin nutras per amaraj poligonfolioj. Ĉiu havas sian kutimon kaj sian kapablon. Laŭ absoluta vidpunkto oni tute ne povas distingi ke iu estas bona kaj alia malbona. Ĉiu per sia maniero koncernas la ekzistadon kaj evoluadon de la universo.

Estas same ankaŭ rilate homojn. Post ĉio, se homo agas vere laŭ sia ŝato kaj laŭ sia volo, ne trompante sin mem, per tio li ja servas al la Dia entrepreno. Kiam homo povas esti vere kontenta pri sia nuna agado, post introspekto pri diversaj flankoj, li ja povas krei “hura!”.

Kiam homo soifas, li serĉas akvon; kiam estas malvarme, li deziras fajron. En somero oni ŝatas ombron sub arbo, dum en vintro oni sopiras sunradiojn. Ĉu io estas bona aŭ malbona, tion

decidas nur ies tempo kaj ies situacio.
Nenio estas absoluta.

Ŝajnas iom ne konvene preni manĝobastonetojn per la sama mano, per kiu oni ĵus uzis la necesejan paperon. Sed tio ne estas evitebla. Kaj tamen troviĝas ekstremaj stultuloj, kiuj nur elmontras malpurajn flankojn, neglektante la belajn.

Sciu ambaŭ flankojn, frontan kaj dorsan kaj diru kaj montru kiel eble la flankojn bonajn kaj belajn.

La mondo, kie mi loĝas, estas mia mondo, la mondo kie alia loĝas, estas alies mondo. Ne nur mi estas bona, sed ankaŭ la alia ne estas malbona. Ne nur mi, sed ankaŭ alia estas vera, ĉar ambaŭ estas dotitaj per parto de Dia forto.

Neniam kaj neniel oni devas trudi sian manieron al aliaj, ĉar ĉiu kondutas laŭ sia originala karaktero. Kaj tamen samtempe ĉiu ne devas ŝpari penon por doni bonan influon al aliaj, ĉar eĉ la originala karaktero iom post iom ŝanĝiĝas.

La unuavice plej grava afero, kiun homo devas respekti, kiel membro de la socio, estas la diskreteco ne malhelpi alies liberecon. Eĉ inter familianoj, kiel gepatroj, gefiloj kaj gefratoj, ĉi tiu principo estu observata, ĉar ĉiu havas apartan korpon, apartan

aĝon, apartan kapablon kaj apartan ŝaton kaj tial, nature havas apartan postulon siatempe. Eĉ gepatroj ne tro retenadu agon de l' gefiloj, se ĝi ne estas grave malbona.

Ne nur rilate homojn, eĉ al simpla herbo aŭ ŝtoneto ni devas doni kiel eble plej grandan liberecon laŭnature. Ankaŭ rilate objektojn artefaritajn, ni devas atenti kiel eble plej bone utiligi ilin respektive laŭ ilia misio.

Homoj, kiuj tion efektivigas en ĉiutaga vivo, ja estas la plej fidelaj al Dio.

La malforta punkto de la ĝenerala homa koro estas enviemo, kiel diras la popola proverbo: “pli bongustas kuko de najbaro”. Sed tio venas de sencio pri la realaĵo de la mondo, ĉar estas malfacile penetre travidi la internon, malhelpate de la eksteraĵo. Ĉiu havas sian suferon malgraŭ ekstera aspekto, kiel la akvobirdo, ŝajne trankvile naĝanta, devas ĉiumomente movadi la piedojn sub la akvo.

Ĉio montriĝas interesa al homo, kiu enlumiĝis; en lia kora ĉielo brilas la plenluno serena. Ĉio aspektas malĝoja, kiam homo perdas lumon en la koro. Li baraktas senĉese en malluma abismo. Preninte nur unu taseton da manĝo, trinkante unu botelon da vino, poste kuŝante kun kapo apogita sur sia brako, kaj de tempo al tempo trinkante nur simplan akvon, homo povas ĝui senliman feliĉon. Bravega heroo,

kies forto povas transmovi monton, kaj kies vervo kapablas subpremi la tutan mondon, venkinta sepdek fojojn da milito, havanta neniun malamikon tra la mondo — tiu heroo tamen povis ĝui la feliĉon nur dum mallonga tempo; subite lia kastelo estis plene sieĝita de malamika armeo, kies plejparto kantis kanton de lia propra regno (tio signifas ke lia popolo perfidis kontraŭ li)*.

Tute ne estas difinite, kio faras homon feliĉa, kio malfeliĉa. Kun io ajn homo povas esti feliĉa, nur se li sentas sin feliĉa.

* Noto de la tradukinto: ĉi tio estas citaĵo el ĉina historio.

Homo tute ne estas iluminito, dum li rigardas la mondon kun malvarmaj okuloj, penante, ke li estas soleca inter la homoj de la mondo, kiuj ĉiuj estas nur fremdaj. Tio estas pro lia malvastanimeco. Forigu la fremdecan senton al kia ajn homo kaj mem alproksimiĝu al li kaj oni elkore konvinkiĝos, ke ĉiuj estas gepatroj, gefiloj aŭ gefratoj.

Neniam havu antaŭjuĝon pri iu ajn persono ekz. ke li estas fripono ne tolerebla. Prefere havu grandaniman komprenon pri lia nuna korsituacio, ke ĝi estas sur certa stadio intertempa al la celo de progreso tra tia kaj tia ŝtupoj.

Havante altaĝon, homo forgesas la

junulan koron; je reakiro de la sano perdiĝas la memoro pri hospitala lito. Sed ĉiuj iam estis infanoj mispismaj, ĉiuj endormiĝis sub patrina lulkanto.

Multaj homoj nur rekonas la korsituacion kaj logikon, kiujn ili scias, kaj ignoras ekziston de aliaj senlimaj korsituacioj kaj logikoj ekstreme komplikitaj. Kaj ili aŭdacas kritiki aliajn homojn, kvazaŭ ili ĉion scius.

Mi antaŭe diris: “lasu homon fieri, kiu volas fieri” kaj “lasu tiun fari nenion, kiu volas nenion fari”. Sed efektive mi diris tion nur kiel provizoran rimedon, sed mi neniel pravigas tiajn kondutojn vere bonaj. Mi nur kredis ke la menciitaj homoj mem rimarkos sian eraron dum laŭvola agado kaj elkore turnos sin al ĝusta direkto. Sincera pento estas ebla nur laŭ tia maniero.

Por rerektingi kurbigitan najlon oni devas ĝin bati per martelo. Sed por reĝustigi homon oni neniel devas uzi perforton. Ĉiu homo estas dotita per memstara koro. Sen moviĝo de tiu memstara koro neniam okazas efektiva reĝustigo de homo. Kio disponas homon, tio estas li mem, sed neniu alia. La korpon oni povas subpremi perforte, sed neniel la koron. Ve al la moderna tempo, kiam homoj kredas ke la punado al la korpo povas konverti la koron.

Nur la enlumiĝo, kiun homo akiris per

sperto de spirita eraro, povas esti vera enlumiĝo.

Nenio helpas al tia homo, kiu obstine kredas sian senerarecon malgraŭ ĉio.

Kontentigu la internajn dezirojn

La ĝuinda gusto de la vivo estas en varieco.

La suĉinfano nur deziras la lakton kaj nenion alian. Kiam ĝi iom kreskas, ĝi deziras kukon kaj sin distras per ludoj la tutan tagon ĝis vespera krepusko, sed deziras nenion pli.

Kiam li eniras en liceon, li enhavas deziron fariĝi iel eminenta sinjoro, legi ŝatindajn librojn, frekventi kinejojn, aŭskulti kuriozajn rakontojn ktp., ĝis fine li renkontas la problemon pri alisekso, komencas pensi pri la homa vivo, kaj rigardi la socion. Kiam li havas la aĝon de dudek kvar aŭ kvin jaroj, li jam pli malpli komprenas la mondon kaj fariĝas serioza en la koro kaj samtempe ekhavas tiom pli intensan deziron pri mono kaj vivo. Plejparto da homoj estas regataj de tiuj deziroj ĝis la lasta momento de l' vivo. Iom da homoj tamen superas tiajn dezirojn kaj al si alproprigas la universalan amon. Oni povas diri, ke ili jam portas la econ de Dio, sed ĉi tiu situacio estas atingebla nur post longa baraktado.

Ĉiuokaze por atingi la menciitan korszitacion oni devas nepre trapasi

la ŝtupojn de ĉefe materiaj deziroj, kiaj estas jam priparolitaj antaŭe. Oni ne povas diigi homon unusalte. Laŭ natura enlumiĝo de la koro homo prosperas kun siaj pensoj, sentoj kaj deziroj, iom post iom pli alten de la plej malsupra ŝtupo. Restas nur demando, ĉu oni haltas longtempe sur ĉiu ŝtupo, ĉu oni rapide supreniras, tuj perdinte intereson ĉiuŝtupe. Do al suĉinfano oni devas doni lakton en la komenco kaj gvidi ĝin tiel ke ĝi plej baldaŭ komprenu la lakton kaj transiri al la sekvanta ŝtupo.

Estas vane, se al suĉinfano oni predikas vortojn de Konfucio aŭ de Biblio.

En la periodo, kiam la infanoj avidas dolĉaĵojn, donu al ili laŭeble multe da dolĉaĵo por ilin satigi. Baldaŭ ili konos la “dolĉaĵon” kaj volos progresi al la sekvanta regiono. Dum la periodo, kiam la junuloj estas kaptitaj de tre forta seksdeziro, donu al ili la eblon ĝui tiun plezuron en la kadro, ne fali en gravan malbonon. Oni devas nepre kontentigi tiun deziron en konvena grado, ĉar ĝi estas la premiso por baldaŭ koni la homon kaj la socion. Homo, kiu ne prapasis tiun stadion, havas mankon ie en la personeco, se li estu granda eminentulo, ĉar li ne havas unu el la plej gravaj spertoj, kiel homo.

Deziri kaj akiri; akiri kaj deziri — tiamaniere transiri senlime al la idealo unu ŝtupon post alia — tio estas ne nur

la homa vivo, sed ankaŭ la vivo de la granda universo.

Oni ne povas fari bonon, sen koni malbonon; la sukceso ne estas atingebla sen sperto de multaj eblaj fuŝoj. Ĉiuokaze homo kuraĝe faru ion laŭ sia konvinko. Estas malbone ĉiam sin retenadi, dezirante tujan kaj nepran sukceson.

Por diri laŭ unu flanko, homo, kiu estas plej fidela al si mem, estas plej konforma al Dia volo.

La kolonoj estu kiel kolonoj, la traboj, kiel traboj kaj la tegoloj, kiel tegoloj kaj konstruiĝas unu domo.

Dio donas kaj la homo uzas. Elmontri ĝuste kaj nete tion, kion Dio donis, estas vero, bono kaj belo.

Estas ja verulo, kiu povas agi tute laŭ sia volo, super juĝo kaj takso de la banala mondo.

Al homo estas plej agrable, kiam li kondutas plej fidele al sia animo. Inverse diri, la plej agrabla al si konduto estas la plej konforma al Dia volo.

La plezuro — t.e. — la Vero!

Homo, kiu ekstreme sin elmontras, plenumas plej bone la mision ĉielan.

Se homo faras siatempe tion, kion li ekvolis, li ne havas ian nubon en la koro kaj ĝuas trankvilecon en kia ajn situacio.

Estas diferenco inter la plejbono de la infaneco kaj tiu de l' juna aĝo kaj tiu de l' plenaĝo. Eĉ rilate la plenkreskulojn, diferencas la plejbono de homo spirite ne matura dis de tiu de homo spirite maturiĝinta.

Tio, kion oni pensis bona en la infaneco foje montriĝas poste malbona. Tio estas tute ebla kaj neniel riproĉinda. Ne gravas, se la siatempa plejbono poste estos malbona; nur gravas la plejbono siatempe. La kadro kaj la kvalito de la plejbono ŝanĝiĝas pli alten kaj pli profunden, ŝtupon post ŝtupo, laŭ progreso de la koncerna persono. Kaj tiel estas en ordo.

Io, kio estas la plej netolerebla por homo, estas monotoneco. Homo vivanta en monotoneco, ne havas plezuron nek valoron.

Feliĉa estas homo, kiu pasigas ĉiun tagon ne en tedeco, sendemande, ĉu li suferas aŭ plezuras.

La primara karaktero estas dotita de Dio. Ĝin elmontri kiel eble plej bone — tio estas atribuita al ĉies penado.

Kiam homo vere komprenas, tiam li povas tion montri en ago. Se li ankoraŭ ne povas agi, eĉ se li fajfas buŝe, li ja ne komprenas vere.

Nenio estas timinda en la mondo por homo, kiu povis decidi vere sin fordoni.

Bonvenon al Oomoto en 2007!

<De la 12-a ĝis la 14-a de aŭgusto 2007, en Ajabe >

Tuj post la 92-a Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Jokohamo, Japanio en 2007, ni, la Centra Oficejo de Oomoto, Universala Homama Asocio (UHA), kaj Esperanto-Populariga Asocio (EPA) kune aranĝos la internacian eventon en la naski ĝloko de Oomoto, Ajabe, en la gubernio Kioto, bonvenigante al si diversnaciajn esperantistojn por profundigi amikecojn per japanaj tradiciaj artoj, la Uta-festo de Oomoto kaj ceteraj. Bonvolu ne maltrafi tiun ĉi raran ŝancon por plene gravuri kaj japanajn kaj internacietosajn memorojn en via koro.

<Trajto de la Programo>

(La 11-an de aŭgusto)

5:00 pm: Akcepto; interkonatiĝa vespero sub nokta ĉielo.

(La 12-an de aŭgusto)

9:30 atm: Malferma ceremonio; prezentado de japanaj tradiciaj artoj sur la noo-scenejo.

13:30: Prezentado pri Oomoto; kio estas Oomoto kaj la Uta-festo? (fare de la videofilmoj kaj lekcio); kiamaniere faru la utaon? 19:00: Vizito al la Vilaĝo Miroku (teksejo, potbakejo kaj aliaj). 21:00: Interamikiĝa vespero.

(La 13-an de aŭgusto)

8:30 atm: Prezentado kaj praktiko pri japanaj tradiciaj artoj; teceremonio, kaligrafiaĵo kaj batalarto. 13:00: Lekcio pri "kio estas la celo de la Uta-festo de Oomoto?" Vizito al la centra oficejo de Oomoto en Kameoka, kie okazas la Festivalo de oomotanaj geknaboj kun kiuj oni povos ĝui la Miroku-dancon, la folkloran dancon, vestante sin en japanaj somervestoj.

(La 14-an de aŭgusto)

10:00 atm: La Uta-festo de Oomoto; premiado, salutoj ktp. Ĝis la revido!

<Aliĝnotoj>

Titolo de la evento: Bonvenon al Oomoto en 2007!

Dato: De la 12-a (mateno) ĝis la 14-a (tagmezo) de aŭgusto en 2007

Aliĝnombro: 60 kromjapanoj

Loko: La Centra Oficejo de Oomoto, Ajabe en Kioto (Bajŝo-en, Ajabe-ŝi, Kioto-hu, 623-0036, Tel: 0773-42-0187 Telefakso: 0773-43-0220, Ĉirkaŭ 80 kilometrojn nordokcidente de la urbo Kioto)

Aliĝkotizo: (inkluzive de la kostoj por 8 manĝoj kaj 2 tranoktoj en Oomoto)

*A-kategorio=50 eŭroj por 1 persono

Tranoktejo: Oomota dormejo japanstila, unu ĉambro por 3~10 personoj

*B-kategorio=40 eŭroj nur por la aliĝintoj antaŭ la fino de la jaro 2006

Tranoktejo: Oomota dormejo japanstila, unu ĉambro por 3~10 personoj

*C-kategorio=60 eŭroj nur por la aliĝintoj post la fino de aprilo en 2007

Tranoktejo: Oomota dormejo japanstila, unu ĉambro por 3~10 personoj

*D-kategorio=15 eŭroj escepte de 2 tranoktaj kostoj

EPA peros porkomercistan urb-hotelon ekster Oomoto (ĉ. 20 minutojn per piedoj for de Oomoto: (A)1-lita,(B) 2-lita,(C)luksaj ĉambroj estas disponeblaj laŭ la hotela tarifo: 1 nokto por 1 persono, inkluzive de matenmanĝo=13,000~18,000 enoj)

Tiuj povos esti ne rezerveblaj post la fino de februaro en 2007, kaj post la fino de julio ne eblas malmendi la rezervon.

Aliĝmaniero: Bonvolu kontakti kun Esperanto-Populariga Asocio(EPA), malfermante nian hejman paĝon: <http://www.epa/boa.html> aŭ <http://www.oomoto.or.jp/Esperanto/esyokohama/index.html> kaj kompletigu respektivajn demandetojn.

Esperanto-Populariga Asocio (EPA)

Tenon-kjo, Kameoka-ŝi, Kioto-hu, 621-8686 Japanio

Telefono:+81-771-23-2145 Telefakso:+81-771-25-0061

Retpoŝto:oficejo@epa.jp Hejmapaĝo: <http://www.epa/boa.html>



Sanktejo Ćooseiden en Ajabe